Libroservo de Germana Esperanto-Asocio: [www.esperanto-buchversand.de/](http://www.esperanto-buchversand.de/); Libroservo de Universala Esperanto-Asocio: [katalogo.uea.org](http://katalogo.uea.org); Libroservo de CDELI, Svislando: [www.cdelli.org/Libroservo.html](http://www.cdelli.org/Libroservo.html); Esperanto-Retbutiko de FEL, Belgio: [www.retbutiko.net/eo](http://www.retbutiko.net/eo); Libroservo de SAT-Amikaro, Francio: [www.esperanto-sat.info/rubrique29.html](http://www.esperanto-sat.info/rubrique29.html); Libroservo Espero, Slovakio: [www.espero.sk/](http://www.espero.sk/); Libroservo de Esperanto-France: <http://esperanto-france.org/boutique/>; Eldonejo Stano Marček: [www.facebook.com/stano.marcek.esperanto/](http://www.facebook.com/stano.marcek.esperanto/); [http://edukado.net/upload/forumo/8844\\_1367585772.pdf](http://edukado.net/upload/forumo/8844_1367585772.pdf)



Jozefo Horvath

## Rava fabelo, tamen vera


Oni iom malfide prenas en la manojn librojn pri la grandaj mondmilitoj. Estis ja tro multe skribita kaj filmita pri la du terureventoj, kaj pro negativaj spertoj oni ne ĉiufoje kredas la ne malofte fanfaronajn, tromp-memorajn rakontojn.

**K**un iom similaj sentoj mi enmanigis la germanlingvan libron *Kriegsimpressionen*, militaj impresoj de la vaste konata esperantisto Martin Stuppniĝ, homo postvivinta la teruraĵojn de la batalkampo de Monte Cassino. Ĉi tiun unuan impreson mian plifortigis la titolpaĝo, sur kiu videblas la junaĝa portreto de la aŭtoro en la uniformo de Wehrmacht, kun Egiptiaj piramidoj fone kaj atakanta trupo bildantaŭe.

Tamen miaj antaŭsentoj trompis min: mi povis demeti la libron nur ĉe la lasta paĝo 258! Prokrastataj iĝis urĝaj laboroj, promesitaj vizitoj, eĉ la tagmanĝo. Ja temas ne pri la kutimaj militaj memoraĵoj! Ne ja, s-ro Stuppniĝ estas ja ne scienca aŭ literatura verkisto. Sed eble tiel estas pli bone, li ja intereskape kaj -retene rakontas per siaj plej kutimaj vortoj; mi havis la senton, kvazaŭ li parolus al mi ĉeeste, en persona dialogo. Lia lingvaĵo estas tipe aŭstra, ĉiutagece vigla, li uzas multajn aŭstrismojn, kiel kutime en la vivo. Tio tamen estas neniel malavantaĝa, eĉ faras liajn eldirojn pli aŭtentikaj. Malgraŭ ĉi tiu ĉiutageca stilo mi tamen ne dirus, ke li ne havas romanistan talenton, li ja revivigas kaj bildigas la tiutempajn personojn kaj okazintaĵojn per vera literaturista arto kaj lerto.

La rakonto dividiĝas en tri partojn. Kiel aŭstro li estas mobilizita en la germanan Wehrmacht, kaj venas al Monte Cassino, unu el la plej sangaj batalejoj de la dua mondmilito, kie li apenaŭ evitas la sorton de la plejmulto de siaj kamaradoj. Li vundiĝas kaj militkaptite longe kuraciĝas en lazareto. Poste li estas transportita en militkaptitejon en Egiptio. Kaj por mi ĉi tie, en la lazareto kaj militkaptitejo, komenciĝas la plej interesa parto de la peripetioj de la juna soldato.

Por Martin gravas ja ne tiom la militaj operacoj, ĉi tiuj ĉeestas nur fone, sed plie la interpersonaj kontaktoj, la reagoj de la ĉirkaŭhomoj al certaj defioj kaj situacioj,




homeca rilatiĝo al kaj de la malamikoj. Kio movas la homon, kaj en kiu direkto? En la priskribo de ĉi tiuj interrilatoj manifestiĝas la vera humana mesaĝo de la libro: optimismo kaj memhelpa agemo en la solvado de la ĉiupaŝe prezentiĝantaj problemoj. Kiel la angla flegistino en la lazareto, „sister Ann“ diras: „Bewegung ist Leben“, movi sin estas vivi. Mi kredas, ke tio estis kaj estas la vivdevizo de s-ano Martin, kiu pluhelpis lin dum lia longa ekzistado ĉi-tera tra ĉiuj stumbliloj kaj kaptiloj de la vivo. La unuapersona rakontanta protagonisto sagace eltrovas en ĉiuj ŝajne nesolveblaj situacioj la elirvojn, kaj konservas en ĉiuj cirkonstancoj sian homecan sintenon kaj indecon de sia persono. Liaj rimedoj por tio estas simplaj, esperi kaj agi. Inda programo ankaŭ por esperantistoj, kio destinas la libron esti legata ankaŭ de la negerman-lingva samideanaro. Kiel mi estas informita, lertpluma aŭtoro jam entreprenis ĝian translingvigon.

Malfacile mi difinus la ĝenron de ĉi tiu libro: ĝi estas iaspeca membiografio, ja temas pri la personaj rememoroj de la aŭtoro kun preciza indiko de lokoj, personoj, organizoj, armeopartoj, eventoj kaj cirkonstancoj, tamen mi ne asertus, ke ĝi ne estas romano, la protagonistoj agas ja kiel en romanoj, la etoso estas daŭre streĉa kaj atentokapta, la sinsekvo de la eventoj logike ĉenita kaj spirhaltiga.

En tiel longa tempoperspektivo de ĉ. sesdek jaroj detaletoj, konversacioj, ĉiutagaĵoj kompreneble apenaŭ rememoreblas precize, kvankam vivogravaj eventoj certe povas fikse engravuriĝi en la memoro. S-ro Stuppnig elektis brilan kaj unusole taŭgan metodon: li plektis el la restintaj memoreroj rave interesan teksaĵon, kompletigante la memorhiatojn per romaneca fabelado. Kio signifas, ke probable ne ĉio okazis tiel, kiel priskribite, tamen estus povinta okazi tiel. Kiel en romanoj... Kaj tio faras la legavidon nehaltebla.

Tre simpatia estas por mi la filozofio de la aŭtoro: li prenas ĉiufoje la cirkonstancojn donitaj, kaj agordas sian farmanieron laŭ tio, „nekuraceble“ esperas kaj fidus ĉiufoje pri ia solvo, elirvojo, kaj trovinte ĝin li ne preterlasas agi. Lia senĉesa optimismo interalie malfermas liajn okulojn al la belaĵoj, bonaĵoj, valoroj de nia vivo. Bela manifestiĝo de tio en la libro estas ekzemple,



forlasi la internigejon, nur por propraokule vidi la piramidojn. Li trovas tiujn punktojn de eblaj kontaktoj kun siaj kaptintoj, kamaradoj kaj la loka loĝantaro, laŭ kiuj ili povas kunlabori kaj kunvivi solidare kaj utile por ĉiuj. Do li kapablas trovi la komunan lingvon – laŭ la revo de Zamenhof...

La libron kompletigas kelkaj fotoj, kaj la konfeso de la aŭtoro, ke li bezonis sufiĉan distancon disde la eventoj, por – liberiĝinte de la tre kompreneblaj inkubsonĝoj – povi pli objektivite vidi la okazintaĵojn. La volumo estas ekstere plaĉe formita, tamen kun kelkaj iam elsarkindaj ortografiaj kaj ĉefe

interpunkciaj mankoj interne.

Mi rekomendas la libron kun la propraj vortoj de la aŭtoro el la Prologo de lia verko: [meine Kriegsimpressionen] mögen das „Friedensbewusstsein meiner Nachfahren stärken“, do ke [miaj militaj impresoj] plifortigu la packonscion de miaj posteuloj!

**Fragmento el la libro:** *Immer wieder bergauf und bergab! Jedoch nicht mehr so steil, wie zuvor im Zentrum der Abruzen. Nun ruhten wir mehr bei Nacht und gingen bei Tag. Die Nächte wurden auch kürzer, so litt ich weniger wegen meiner Nachtblindheit. Einmal geschah es, dass wir – die Vorhut – schon das vorgesehene Ziel erreicht und die paar Behausungen durchsucht hatten, der Oberleutnant ankam und sagte, nein, wir schaffen noch die nächste Höhe! Ich dachte, das wird knapp! Ich richtete mich auf eine höhere Geschwindigkeit ein, um noch vor der Dunkelheit dort anzukommen. Wegen meines Tempos habe ich alle abgehängt und auch die Gehöfte schnell inspiziert. Nur eine Scheune war daneben, die ich mühsam öffnete - und oh Schreck! Hinter einem Heuhaufen sah ich zwei Kinderköpfe mit vor Angst weit aufgerissenen Augen! Ich hängte meine MP um und deutete mit beiden Händen, dass sie dahinter verschwinden sollten. Das war knapp, denn hinter mir kamen zwei meiner Begleiter – und wir hatten Schießbefehl! Wie jetzt die Kinder retten – und dahinter sind sicher auch ihre Eltern? Ich sagte – auch etwas später dem Oberleutnant, es sei wie üblich alles verwaist und dass ich mich gleich hier niederlassen werde. Da war schon eine einladende Heumulde, für einen müden Krieger. Ich sagte, dass in den Häusern auch Liegestätten wären, wie sie bei Bauern üblich sind. Ich hörte noch die Wacheinteilung, vernahm meinen Namen nicht und schloss beruhigt das Scheunentor. Durch mein Husten und „buona notte“ gab ich zu verstehen, dass nur ich hier liege. Ich richtete mir mein Lager und habe sonst alles versteckt - dennoch griffbereit. Ich schlief sicher „unüberhörbar“, so dass ich auch selbst kaum etwas*

*bemerkte. Denn frühmorgens als ich wach wurde, entdeckte ich neben mir eine Schale Milch und daneben einen kleinen Wecken Weißbrot. Wie und warum, war nebensächlich. Ich hatte Hunger und aß alles weg. Es schmeckte gut, obwohl das Brot ungesalzen war. Am Papier, in das es eingewickelt war, stand: Grazie! Ich unterstrich das behelfsmäßig und legte es unter die Schale. Draußen vernahm ich schon Bewegung und etliche Kommandos. Da machte ich mich auf, um auch das „Nötigste“ zu verrichten. Willst du nicht auch etwas essen fragte mich der Austeiler oder warst du in einer Trattoria? Ich machte den Spaß mit, damit niemand auf andere Gedanken komme. Dennoch dachte ich: Hatte Gott das mit mir vor? Wieder eine Befehlsverweigerung! Aber was können denn die unschuldigen Kinder dafür, dass die Welt „verrückt spielt“? Hat man uns doch auch als halbe Kinder von den Eltern und der Berufsausbildung entrissen! Und hier, diese Kinder – nein! Andere hätten vermutlich befehlsgemäß geschossen und die ganze Scheune samt Unterbau umgedreht! Nun ging es gottlob wieder weiter nordwärts – die Berge auf und ab. Später erreichten wir die Apenninen, die Weinberge und bezogen dort abwechselnd lukrativere Stellungen.*

*Hochgebirgsjäger? Nur weil ich einmal zum Hochgebirgszug überstellt werden sollte! Ja, offenbar war ich als solcher noch eingetragen – aber man hat damals meine Nachtblindheit doch als existent berücksichtigt. Nun in den Apenninen sind wir wohl nicht mehr so gefragt. Jedenfalls musste ich mich beim Hauptgefechtsstand melden. Ich habe doch nichts „ausgefressen“. Oder was hat man sonst mit mir vor?*



# Esperanto? Na klar!

## Ein Appell für mehr Selbstbewusstsein

**Dieser kleine Artikel ist bewusst auf Deutsch geschrieben. Denn wir Esperantisten wollen ja Menschen an Bord holen, für die Esperanto etwas Neues, Unbekanntes, Exotisches und vielleicht sogar ein bisschen Lächerliches ist.**

**Erste These:** Wenn wir die Vorzüge unserer frei gewählten Sprache propagieren wollen, müssen wir das in unserer „Muttersprache“ tun.

**Zweite These:** Esperanto ist nicht minderwertig, weil es nicht von Abermillionen Menschen gesprochen wird. Wenn etwa der Vizepräsident des deutschen Bundestages Johannes Singhammer (CSU) beklagt, dass von 1.510 Dokumenten der EU-Kommission 1.202 Anhänge und Zusätze auf Englisch hätten und daher Bundestagsausschüsse deren Bearbeitung verweigerten (auch wenn „viele Abgeordnete hervorragend Englisch“ sprächen), sagt das einiges aus. Die „schleichende“ Weltsprache Englisch hat sich keineswegs so durchgesetzt, dass sie als gleichwertige Verkehrssprache sogar nur in Europa herhalten könnte; Übersetzungen sind nach wie vor ein Thema; zugleich zeigen die Reaktionen im Leserforum des „SPIEGEL“, der Singhammers Äußerungen aufgriff, wie eng Sprache und Nationalismus miteinander verquickt sind. Den meisten Lesern geht es nicht um Verständlichkeit und Lesbarkeit von Texten, sondern um die „Herabwürdigung“ „ihrer“ Sprache.

**Dritte These:** (National)Sprachen dienen nicht der Verständigung, sondern der Abgrenzung. Seit 1989 erleben wir in Europa eine erschreckende Renaissance des Nationalismus, besser: des Chauvinismus. Ein Fülle mehr oder minder lebensfähiger Kleinstaaten ist entstanden, für die neben mehr oder minder authentischen „Nationalmythen“ vor allem auch die Sprache ein konstituierendes Merkmal ist. Daher haben wir nicht nur das Aufdröseln von Sprachen (Serbokroatisch, zerlegt in „Einzelsprachen“) erlebt, sondern auch Gesetze zur Unterdrückung „feindlicher“, also minoritärer Sprachen. Plastisch beschreibt Ibon Zubiaur in seinem Buch „Wie man Baske wird“, wie der „Erfinder“ der baskischen Nation, Sabino Arana, im 19. Jahrhundert



teilweise ein baskisches Vokabular erfand, um eine gemeinsame Sprache des „baskischen Volkes“ zu schaffen, welche dieses so nie gesprochen hatte. Aber zur Abgrenzung war dieses „Neo-Baskisch“ allemal gut genug.

**Vierte These:** Esperanto? Na klar. Ich selbst habe gut eineinhalb Jahr gebraucht, bis ich ohne entschuldigenden Unterton eingestanden habe, Esperanto zu sprechen (bzw. es zu lernen). Anfänger fühlen sich oft in eine neue Welt hineinkatapultiert, die so ganz anders ist als die gewohnte sprachliche Umgebung. Gerade der wachsende nationalistische Druck in ganz Europa, das Beschwören von „Leitkulturen“ durch Vertreter populistischer Bewegungen, die oft genug selbst keinen geraden Satz herausbringen, macht uns Esperantisten zu sowas wie „Sprachmigranten“. Umso entschiedener müssen wir unser „Coming Out“ betreiben. Esperanto? Na klar! Das spricht man jetzt, wenn man nationaler sprachlicher Engstirnigkeit Weltoffenheit und Wissbegier entgegenzusetzen will! Plansprache ohne Staat dahinter? Aber ja! Finden wir super! Immerhin hat noch nie in der Geschichte eine Esperanto-Armee andere Völker unterworfen und ihnen als „Geschenk“ die Plansprache des Dr. Zamenhof aufgezwungen!

**Praktischer Tipp:** Viele Menschen, auch Esperantisten, fragen nicht-deutschsprachige Personen fast automatisch: „Do you speak English?“ (auch wenn ihr eigenes Englisch oft mäßig ist). Warum fragen wir nie: „Ĉu vi parolas Esperanton?“. Wenn wir im Internet, in Social Media, aktiv sind – warum zitieren wir nicht ganz selbstverständlich Quellen in Esperanto? Wenn jemand wissen will, worum es geht, kann er uns entweder fragen oder elektronische Übersetzungsprogramme zwischenschalten, welche mit der regelmäßigen Plansprache ziemlich gut zurecht kommen.

Machen wir Esperanto zu einem Teil unseres eigenen öffentlichen Lebens, zeigen wir so die Vitalität „unserer“ Sprache.

**Kurt Lhotzky**

## SAT kongresis en Slovakio



La 88a Kongreso de SAT okazis aŭguste en la slovakia urbo Nitra. La kongreson partoprenis pli ol 50 Esperantistoj el 18 landoj. La kongresejo estis en la universitata student-hejmo Anton Bernolák. Antaŭ la inaŭguro oni prezentis kelkajn ĵus eldonitajn librojn de la SAT-eldonejo, de la hispana SATEH, kaj Peter Baláž prezentis sian kolekton. Dum la kongreso okazis kvar laborkursidoj, socialaj forumoj pri Grekio, Usono, Latin-Ameriko, Mezoriento kaj Orienta Azio, raportoj pri laborgrupoj kaj jarraportoj. Kunvenis liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, vegetaranoj, verduloj kaj la LEA-komitato. Okazis informoj pri Vikipedio, pri pretigado kaj farado de *Sennaciulo*, pri PIV kaj pri novaj planoj de E@I. Stano Marček prelegis pri fungoj kaj informis pri siaj diverslingvaj lernolibroj *Esperanto per rekta metodo*; pri la familio kaj la verkaro de la fratroj Josef kaj Karel Čapek parolis Petr Chrdle. La ekskursoj gvidis la partoprenantaron al turismaj celoj en la ĉirkaŭaĵo. Vesperaj kulturprogramoj konsistis el prezento de slovakia popolmuziko, vingustumado kaj dancado, filmoj kaj la teatraĵo R.U.R., prezentita de studentoj el Svitavy. Koncertis ankaŭ la muzikgrupo No problem kaj Attila Schimmer. La venontjara SAT-kongreso okazos en Herzberg am Harz — La Esperanto-urbo, de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016. (Liba Gabalda, *La Ondo de Esperanto*)

## Premio Degučî 2015 al Ēva Farkas-Tatár

La Premio Onisaburo Degučî estis starigita per donaco de Oomoto (japandevena religio kiu oficiale subtenas Esperanton) en 1987, kaj estas aljuĝata ĉiujare. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj. Laŭ sia regularo la premio estas asignata pro meritoj en la utiligo de Esperanto kiel rimedo por monda paco

kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de Zamenhof kaj al instruoj de O. Degučî (kunfondinto de Oomoto), kaj pro kontribuo al la celo de UEA kreskigi inter la membraro fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj. La estraro de UEA aljuĝis la ĉi-jaran premion al Ēva Farkas-Tatár, Hungario. La decido estis anoncita dum la 100-a UK en Lillo. Ēva Farkas-Tatár naskiĝis en 1924 kaj lernis Esperanton en 1961. Dum 50 jaroj ŝi instruis laŭ la Cseh-metodo en multaj landoj kaj revenigis tiun instrumentodon al ĝia kerno: la gaja, luda maniero, dank' al kiu la lernanto tuj ekparolas Esperante. Tiun arton ŝi transdonis al multaj novaj instruantoj. (Zsófia Kóródy) Rim.: Artikolo pri la legenda Esperanto-instruisto Andreo Cseh legeblas en la retejo de *La Balta Ondo*: <http://sezonoj.ru/2015/10/mill>

## 52 novaj libroj en la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko

La uzado en sciencaj kaj profesiaj kampoj postulas terminarojn kaj fakajn esprimojn. Antaŭ ol verki iun ajn sciencajn aŭ fakajn artikolon oni devas konatiĝi kun la jam ekzistantaj terminoj, fakaj esprimoj kaj parolturnoj. Ĉe „Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko“, STEB, estas kolektataj esperantlingvaj teknikaj kaj natursciencaj artikoloj, verkoj kaj elektronikaj libroj en formatoj pdf, html, doc, epub kaj aliaj. Listo de nove aldonitaj libroj estas publikigita en interretaj retlistoj kaj pere de Ret-Info. Se vi konas sciencajn, teknikajn verkojn, ne registritan ankoraŭ en STEB, oni akceptas danke vian informon pri ĝia reta trovadreso. Retejo: <http://www.eventoj.hu/steb/>. Oficejaj kunlaborantoj: Szilvási László kaj Mészáros István, kontakteblo: [oficejo@eventoj.hu](mailto:oficejo@eventoj.hu)

## Konkresaj Kurieroj en la Bitoteko

La Kongresa Kuriero estas inform-bulteno, kiu aperas dum Universalaj Kongresoj de UEA.





Al ĉiu intereso pri la historio de la plej granda evento en Esperantujo estas rekomendata la legado de la Kongresaj Kurieroj, kiuj ekde 1908 (tiam ankoraŭ sub la nomo „Kongresa Gazeto“) regule aperas. Danke al Roland Rotsaert (belga esperantisto), la fondaĵo Cesar Vanbiervliet (Esperanto-kolekto, lokigita en la urba biblioteko de Kortrijk, Belgio) kaj la zorgantoj de Bitoteko ĉiuj Kongresaj Kurieroj elŝuteblas en la interreta biblioteko de la Hispana Esperanto-Federacio pdf-forme. Vidu ĉe: <http://bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/4506>

## Partopreno en la jubilea Ekonomia Forumo en Krynica



En la prestiĝa „Ekonomia Forumo“ en la pola urbo Krynica-Zdrój okazis du jubileoj ĉi-jare: la forumo mem festis sian 25-an jaron, kaj samtempe Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kun la Esperanto-stando partoprenis ĝin jam la dekan fojon. La forumo, ofte nomata „pola Davos“, altiris en septembro rekorde multajn: 3000 partoprenantoj el 60 landoj aliĝis al la evento. La ekonomia forumo estas aranĝo kun pintaj personoj de la politika, ekonomia, sed ankaŭ de la socia kaj kultura vivoj. Multaj diskutoj temis pri la nuna situacio rilate al la rifuĝintoj, defendado kaj armeaj konfliktoj, eŭro-krizo kaj simile. Pri Esperanto kaj rilataj temoj ne okazis propra diskutpanelo de EEU ĉi-jare, pro la troa programo dum la jubilea forumo. Jam la dekan fojon funkciis la Esperanto-stando, kun informiloj pri Esperanto en la 3 laborlingvoj de la forumo (la pola, rusa kaj angla). Ankaŭ disdonitaj estis DVDoj kaj kvizo pri Esperanto kun baza enkonduko al la lingvo kaj ekzercoj. Esperanto videblis ankaŭ per kultura programero – koncerto de Junaj Voĉoj, ensemblo el Nowy Sącz okazis, en la lasta tago de la forumo. (Peter Baláž, *La Ondo de Esperanto*, <http://sezonoj.ru>)

## Virtuala medicina konferenco en Esperanto

Oktobre okazis la 1-a medicina skajpa konferenco laŭ ideo kaj estrata de Roberto Cutiño, familia kuracisto el Kubo, kaj Denice Maldonado, fakulino pri rekapabligo el Meksikio. Entute 9 kolegoj partoprenis la konferencon, unu el Usono, unu el Kubo, du el Kolombio, kvar el Meksikio kaj unu el Germanio. Dum preskaŭ 2-hora kunveno pere de Skajpo ĉiu partoprenanto havis la eblon dum 5-10 minutoj prezenti sin mem kaj rakonti pri sia individua laborkampo. Estis krome prezentitaj mallongaj raportoj, ekzemple pri la medicina prizorgo de rifuĝintoj en Munkeno (Germanio), la signifo de la „internacia tago de psika sano“, kaj la agado de la Universala Medicina Esperanto-Asocio, UMEA. La evento tiel entuziasmigis la partoprenantojn, ke oni decidis okazigi tiun formon de kunveno regule ĉiun 2-an monaton. La organizantoj ĝustatempe anoncis la duan konferencon. Interesitoj kontaktu la prezidanton de UMEA, dr-on Christoph Klawe. (ret-info)

## Temo de la 101-a Universala Kongreso

En la jaro 2016, la unuan fojon en la historio, gastos Slovakio en la urbo Nitra la Universalan Kongreson de Esperanto. La estraro de UEA anoncis, ke „Socia justeco - lingva justeco“ estos la kongresa temo de la 101a UK en Nitro. Kiel okazo por tiu-ĉi decido povas esti konsiderata la 20-jara datreveno de la subskribiĝo de la Manifesto de Prago, kiu tiutempe celis priskribi la rilaton inter Esperanto kaj aliaj sociaj temoj. La prezidanto de UEA, Mark Fettes,

en sia tema enkonduko rimarkigas, ke necesas trovi lokon por Esperanto en aliaj movadoj, en kiuj ofte mankas konscio pri lingva justeco, kaj rekomendas, ke la esperantistaro pliprofundigu sian propran komprenon pri la temo cele al pli bona kunlaboro kun eksteruloj. La Slovaka prezidento Andrej Kiska jam transprenis aŭspicion super la UK kaj la Slovaka poŝto preparas specialan emision de poŝtmarko. (Gazetaraj Komunikoj de UEA kaj aliaj fontoj interreataj)



101-a Universala Kongreso de  
**ESPERANTO**  
23.-30.07.2016 Nitra, Slovakio

## Litovio: Renkontiĝo en la parlamento



En oktobro 2015 vicprezidanto de la Litovia parlamento kaj samtempe prezidanto de la parlamenta komitato pri eŭropaj aferoj G. Kirkilas akceptis la prezidanton de Litova E-Asocio P. Jegorovas. Estis interkonsentite, ke Kirkilas kun la delegacio, kiun krome eniros unu litova lingvisto kaj unu reprezentanto de neregistaraj organizaĵoj, partoprenos la internacian lingvo-politikan konferencon „Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio“, okazantan en julio 2016 en la Slovacia urbo Nitra, kie tiutempe okazos ankaŭ la 101a Universala Kongreso, en la periodo kiam Slovakio prezidos Eŭropan Union. Gediminas Kirkilas delonge subtenas Esperanton.

(La Balta Ondo, <http://sezonoj.ru/2015/10/litovio-13>)

## Bultenoj de Internacia Fervojista Esperanto Federacio en interreto

La tutmonda asocio de esperantistaj fervojistoj IFEF, fondita en 1948, estas faka sekcio de UEA kaj membro de la Internacia Federacio de la Artaj kaj Intelektaj Fervojistaj Asocioj. La celo de IFEF estas disvastigi kaj apliki Esperanton en la fervojaj administracioj kaj en la fervojistaj medioj kaj rondoj. IFEF eldonas bultenon *Internacia Fervojisto*, en kiu oni povas legi pri la aktivaĵoj de IFEF, fervojaj aktualaĵoj en la mondo kaj anoncoj kaj raportoj pri renkontiĝoj. Nun kolekto de la bultenoj, ekde la jaro 1910, estas troveblaj sur la oficiala paĝaro: <http://ifef.free.fr/bultenoj/>

## ILEI-konferenco en Belgio

Julie en Oostende, Belgio, okazis la 48-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, organizo fondita en 1949 en Bournemouth, UK. La konferenco estis rekorda en la historio de ILEI: 170 aliĝoj el 34 landoj, 138 partoprenintoj el 30 landoj, junuloj kaj infanoj ankaŭ partoprenis. Okazis malferma ceremonio en la urbodomo kun la urbestro, 3 sesioj por la Komitato, elektoj de la nova estraro, prelegoj, atelieroj kaj instruista

trejnado (IT), kiu okazis kun 45 partoprenantoj - atestilojn ricevis 25 partoprenintoj. Ankaŭ estis organizitaj 20 prelegoj; sesio de KER-ekzamenoj, simpozio, kurso por komencantoj kaj Lingva Festivalo kun 35 lingvoj. La libroservon prizorgis la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). La Konferenco altiris grandan atenton de ekstermovada kaj loka publiko pere de organizitaj programeroj: Nacia vespero, kvartala festo k.a. Lokaj gazetoj raportis per 4 artikoloj antaŭ kaj post la Konferenco, okazis ankaŭ unu radio-intervjuo.

(Mireille Grosjean, <http://www.ilei.info/>)

## Nova redaktoro de TEJO-aktuale el Stirio, Aŭstrio

TEJO-aktuale estas retroŝta informilo de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), abonebla senpage. Ĝi aperas 2-semajnrhythme kaj enhavas nur koncizajn, konkretajn informojn pri la junulara Esperanto-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj. Oni povas sendi novaĵojn koncerne junularan Esperanto-vivon al la redakcio. Pri la redaktado de la informservo nun respondecas Jan Kozousek el Leoben, Stirio, Aŭstrio. (tejo.org)

## Pola rapidtrajno baptiĝis „Esperanto“

La administracio de la pollanda ŝtata fervojkompanio PKP lanĉis voĉdonadon pri nomo de InterCity-trajno, veturanta la itineron inter Varsovio kaj Bjalistoko (Białystok). Inter 3 eblecoj la plej multajn voĉojn ricevis la nomo „Esperanto“. La rapida trajno de la kategorio InterCity ekfunkcios decembre 2015. Tiu-ĉi sukceso estis atingita pro diligenta diskonigado kaj voĉdonado fare de la Esperanta interreta komunumo. Ĉi tiu nomigo ne estas la unua por Bjalistokaj trajnoj. Ekzemple, la unuan de junio 2008 en la stacidomo de Bjalistoko la urbestro T. Truskolaski en solena ceremonio ŝanĝis la tabuleton de la





trajno „Bjalistoko – Bielsko-Biała“, kiu tiel renomiĝis de Narew al Zamenhof.

(*La Ondo de Esperanto*,  
<http://sezonoj.ru/2015/10/pollando-4>)

## Fine kreita baza vortlisto por komencantaj kursoj

En 1979 dum la Universala Kongreso Zlatko Tišljar surbendigis interparolojn de kongresanoj kaj tiel kolektis korpuson de parolata Esperanto de 60.000 vortoj. Li tiutempe preparis diplomlaboraĵon por studo en Zagreba Universitato pri morfemofteco de parolata Esperanto. Poste Tišljar transskribis iom malpli ol duonon de tiu materialo, dividante la morfemojn per streketoj, per komputilo, kiu nombris la morfemojn. La morfemofteco de parolata Esperanto aperis libroforme en 1982. En 2015 Raymond Gerard el Belgio kreis programaron, kiu kapablas dispartigi la vortojn en tekstoj al morfemoj, kaj nombri ne vortojn sed morfemojn. Tiu ĉi fakto ebligis kompari la rezultojn de Tišljar el 1982 kun la rezultoj de morfemoj en skribitaj tekstoj, kaj krei novan bazan vortliston. Pli detale pri la esploro eblas legi ĉe: <http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko/1582384>. La vortlisto troviĝas ankaŭ ĉe: <http://lingvo.org/plejoftaj/>

(*Eŭropa Bulteno*, [www.europo.eu](http://www.europo.eu))

## Ludi „Danĝerejoj kaj drakoj“ en Esperanto

Al ŝatantoj de rolludoj verŝajne tre plaĉos nova projekto <http://drakoj.ikso.net/>, lanĉita de la organizaĵo E@I. Ĉi tiu retejo temas pri la rolludo *Pathfinder*, variaĵo de „Dungeons & Dragons“ – foje nomata en Esperanto „Danĝerejoj kaj drakoj“. Ĝi enhavas ne nur detalajn regulojn de la ludo, sed ankaŭ Esperanto-anglangermanan terminaron, kiu enhavas ĉiujn vortojn, kiujn oni povas bezoni en la rolludo. La ludemulo povas tie ankaŭ elŝuti la tutan regularon kiel 111-paĝan libron kaj rolulformularojn — foliojn kun detalaj statistikoj, kiujn



oni bezonas por ludi. Ĉio estas senpaga. La retejon kreis Matthias von Laer, kiu laboris dum unu jaro ĉe E@I per la Eŭropa Volontula Servo.

(*La Ondo de Esperanto*,  
<http://sezonoj.ru/2015/09/drakoj/>)

## Pseŭdoanglismoj

La gazeto B.Z. raportis kiel oni povas hontigi sin en eksterlando per pseŭdoanglismaj esprimoj, kaj montris per tabelo 17 ŝajne angladevenajn vortojn kiel ekz. „Oldtimer“ kaj „Basecap“, kiuj devenas de la germana, kaj estas nekonataj de la parolantaro de la angla, respektive kaŭzas fatalajn miskomprenojn. Ekzemple la vorto ofte uzata en germanparolantaj landoj, nome „Oldtimer“, ne signifas historia aŭtomobilo, sed maljuna viro. Aliaj ekzemploj estas: „Handy“ (angle: bone manipulebla), „Public Viewing“ (angle: antaŭakcepto de ekspozicio aŭ publika monro de kadavro), „Beamer“ (angle: ŝercnomo por aŭto BMW).

(<http://www.vds-ev.de/>)  
([www.bz-berlin.de](http://www.bz-berlin.de))

## Eine Schulstunde über Esperanto - Supplierstunden sinnvoll nutzen

Um den Bekanntheitsgrad von Esperanto zu erhöhen, bietet sich an, dass Schüler in der Schule etwas über Esperanto hören. So ist das Projekt „Eine Schulstunde über Esperanto“ entstanden, das Klaus Friese aus Hamburg mit der Hilfe einiger anderer auf den Weg bringt. In Zusammenarbeit mit Lu Wunsch-Rolshoven vom Verein EsperantoLand hat Klaus Friese nun vor kurzem eine Broschüre für Lehrer herausgegeben. Der deutsche Titel ist „Eine Schulstunde über Esperanto“ (in Esperanto: Unu lerneja leciono pri Esperanto, englisch: A lesson about Esperanto.) Verknüpfung zur Broschüre:

<http://www.esperantoland.org/de/plu.php?msgid=1191>

## Voĉlegu al via infano!

Aktuala studaĵo de la germania Fondaĵo Legado (*Stiftung Lesen*) konkludas, ke se oni regule laŭtlegas al infano, tio helpas al ĝia lerneja povumo kaj socia disvolvigo. Ok- ĝis dekdu-jaraj infanoj, al kiuj estis regule laŭtlegitaj, 70 procentoj el ili havis en la instrufako Germana Lingvo tre bonan aŭ bonan noton. Tio validas sendepende de la klerignivelo de la gepatroj. Cetere la laŭtlegado kontribuas al pli vasta horizonto kaj pli granda repertuaro de kondutmodeloj.

([derwesten.de](http://derwesten.de)) ([stiftunglesen.de](http://stiftunglesen.de))  
(<http://rundbrief.vds-ev.de>)

(Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher)

# Medienecho

**Ich bedanke mich herzlich für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an damit sie nicht im Spam-Ordner landen.**

**Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, werden in dieser Zusammenstellung nicht berücksichtigt.**

**Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die mir aber selber vorliegen, wird hingewiesen. Diese sende ich Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zu. Anfragen an „medienecho@esperanto.de“ - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.**

**Informationen zum neuen URL-Verkürzungsdienst finden Sie unter [espo.link/info](http://espo.link/info).**

## **15. November 2015**

### **PLANSPRACHEN.CH**

Plansprachen-Bewegung in Russland, der Sowjetunion und Osteuropa zwischen Wissenschaft, Politik und Gesellschaft (Teil I):  
[espo.link/156181](http://espo.link/156181)

## **12. November 2015**

### **Neue Berliner Rundfunk GmbH & Co. KG/ Esperantojugend Berlin**

Wir möchten gerne Esperanto-Sprachkurse für Ausländer in Berlin anbieten, speziell für Flüchtlinge. Die Idee dabei ist, dass die Ausländer über Esperanto möglichst schnell eine Sprache lernen können, mit der sie hier Kontakt bekommen können. Das geht in etwa einem Drittel der Zeit, die man für das Deutsche braucht. Und das Schöne daran ist: Wenn sie danach Deutsch lernen, geht das viel leichter. Wenn man auf Esperanto „lampro“ oder „auto“ kennt, lernt man „Lampe“ und „Auto“ ganz schnell.  
[espo.link/156182](http://espo.link/156182)

## **11. November 2015**

### **jugendherberge.de**

In der hessische Landeshauptstadt trafen sich 300 Teilnehmer aus mehr als 30 Ländern zum jährlichen Weltkongress der Esperanto-Jugend.  
[espo.link/156183](http://espo.link/156183)

## **3. November 2015**

### **youpodia.de**

In der Jugendherberge Wiesbaden trafen sich 300 Teilnehmende aus mehr als 30 Ländern zum jährlichen Weltkongress der Esperanto-Jugend  
[espo.link/156184](http://espo.link/156184)

## **22. Oktober 2015**

### **BSW-Blog - Menschen und Geschichten der Stiftungen BSW und EWH**

Saluton, kiel vi fartas? – Wie man Grenzen mittels Sprache überwindet  
Esperanto? Ach so, diese künstliche Sprache, die keinen Ursprung hat? Mit diesem Makel hatte sie jahrzehntelang zu kämpfen. Bis heute ist sie leider vielerorts noch unbekannt. Schade, denn es gibt kaum eine Fremdsprache, die so einfach strukturiert und leicht zu erlernen ist. Warum ist also nach wie vor die Motivation Esperanto zu lernen so gering?  
Ein Interview mit Sebastian Kirf  
[espo.link/156185](http://espo.link/156185)

## **18. Oktober 2015**

### **Der Tagesspiegel**

Herzberg im Südharz ist „La Esperanto-urbo“: Ein Pilgerort für Anhänger der Kunstsprache. Die Stadt ist wohl der weltweit einzige Ort mit zweisprachigen Straßenschildern wie Bahnhof/stacidomo und Rathaus/urbodomo. Auch in zahlreichen Restaurants finden sich Speisekarten auf Deutsch und Esperanto, in Hotels wird Esperanto gesprochen. An einem zentralen Platz ist die grüne Esperanto-Flagge aufgezogen, daneben steht ein Denkmal mit der Büste Zamenhofs, ein Geschenk aus China. Rund um den Juessee, mitten in der Stadt, haben die Esperantofreunde einen zweisprachigen Baumlehrpfad angelegt. Im Heimatmuseum gibt es einen Esperanto-Raum. 2006 stimmten alle Parteien des Stadtrates dafür, Herzberg den Namen „la Esperanto-urbo“ zu geben: die Esperanto-Stadt.  
[espo.link/156186](http://espo.link/156186)  
[espo.link/156187](http://espo.link/156187)

## **7. Oktober 2015**

### **Wrota Podlasia, Region i Gospodarka**

„Esperanto“ – Das wird der Name des PKP-Intercity-



Zuges sein, der ab Dezember auf der Strecke Bialystok-Warschau verkehren wird. Über den Namen wurde von Internet-Nutzern abgestimmt. (polnischsprachiger Artikel).  
*espo.link/156188*

#### **4. Oktober 2015**

##### **Schweriner Blitz am Sonntag**

Im Oktober im Bunten Q  
Esperanto ist das neue Angebot der Projektwerkstatt „Buntes Q“, das ab Oktober zusätzlich zu den bewährten Nachhilfekursen in Schwerin angeboten wird.  
*espo.link/156189* (dort Seite 5)

#### **26. September 2015**

##### **apple itunes**

Ein paar nette, kostenlose Puzzle-Spielchen für Kinder zum Esperantolernen für iPad und iPhone  
*espo.link/156191*

#### **25. September 2015**

##### **openPR – Das offene PR-Portal**

Eigentlich geht's hier um Elektrofahrzeuge, um TRANKVILE electric vehicles.  
Mit ein paar netten Vergleichen zu Esperanto  
*espo.link/156192*

#### **22. September 2015**

##### **Münchener Merkur**

Nachrichten aus Esperantio  
Latein lernen viele, aber so gut wie keiner spricht es. Bei Esperanto ist es umgekehrt: Nur wenige lernen es, aber alle die es gelernt haben, sprechen es. Der Originalartikel ist umfangreicher als die Netzausgabe.  
*espo.link/156193*

Eine Kopie des Original-Artikels zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu:

„medienecho@esperanto.de“, Betreff „Zappelphilipp, Münchener Merkur“.

#### **20. September 2015 (?)**

##### **ifmacologne**

International language created by ophthalmologist „Dr. Esperanto“ celebrates 100th anniversary this month auf Englisch  
*espo.link/156194*

#### **19. September 2015**

##### **Südkurier**

Esperanto: Eine Sprache für die ganze Welt  
Ingrid Gleitsmann aus St. Georgen interessiert sich seit Jahrzehnten für Esperanto. Sie möchte der Weltsprache neues Leben einhauchen.  
„Bonan tagon, kiel vi fartas?“ So begrüßt Ingrid Gleitsmann Besucher in ihrer Lieblingssprache, wünscht einen guten Tag und fragt nach dem Befinden. In einem Zungenschlag, der den Hörer an Latein denken lässt. Gleitsmann spricht die Welthilfssprache Esperanto – und das ziemlich fließend, bereits 1983. „Aber wirklich losgelassen hat es mich nie“, erinnert sie sich.  
*espo.link/156195*

#### **17. September 2015**

##### **Friedensnews.at**

Ein kleiner Bericht zum 100. Esperanto Weltkongress in Lille 2015 – Esperanto-Lerngruppe Wien.  
*espo.link/156196*

#### **16. September 2015**

##### **Märkische Onlinezeitung**

Frankfurt (Oder) - Ursprünglich wollten sie eine Geheimsprache finden, damit niemand sie versteht. Ronald Schindler war damals in der 11. Klasse. An der Volkshochschule in Templin entdeckten er und seine Freunde dann einen Esperanto-Kurs. So begannen sie die weltweit gesprochene Plansprache zu lernen. Das war 1977. Seit einigen Jahren gibt er nun sein Wissen weiter und unterrichtet die Sprache.  
*espo.link/156197*

#### **16. September 2015**

##### **Bensberg im Blick**

Auf den Esperantoseiten von „Bensberg im Blick“ ist ein Bericht über den Wochenen-Kurs in Sundern-Langscheid am Sorpensee erschienen.  
*espo.link/156198*

#### **11. September 2015**

##### **Schweriner Volkszeitung**

Seit 110 Jahren wird in Schwerin Esperanto gesprochen.  
Der Esperanto-Klub Schwerin erinnerte mit einer Festveranstaltung daran, dass bereits seit 110 Jahren die Plansprache in Schwerin zu Hause ist.  
*espo.link/156199*

## Kion donaci?

Ĉu vi ankaŭ konas tion? Estas nelonga tempo ĝis kristnasko aŭ ĝis iu naskiĝtago, kaj vi tute ne havas ideon kion doni al via esperantista amiko. Ne senesperigu! Ĉi tie vi trovos kelkajn proponojn kion donaci, ne nur por la kristnaska festo.<sup>1</sup>

### La klasikaĵoj

Memfaritaĵoj kaj libroj ĉiam funkcias – eble speciale ĉe viaj verdaj amikoj, kiuj aprezas diversecon, individuecon kaj, nu, lingvumadon. Ĉi tie mi ne proponu verajn specifitaĵojn, ĉar kompreneble ege dependas de propraj ŝatoj kaj de via rilato al la donacricevonto: Vi povas pentri, brodi, triki, verki, faldi, kaj multe pli. Rilate al libroj, vi trovas kelkajn rekomendojn en la eldono 2015/4 de *Esperanto aktuell*, kaj ekzemple la libroservo de la UEA ofertas specifan retpaĝon pri novaj varoj<sup>2</sup>, dum ĉe la libroservo de GEA vi povas vidi liston de libroj haveblaj je reduktitaj prezoj<sup>3</sup>.

### La mondo

Esperanto estas (kaj ĉiam estu pli) tutmonda lingvo. Kaj pro tio multaj esperantistoj ŝatas vojaĝi al diversaj lokoj kaj informiĝi pri fremdaj landoj. Por tio, termapoj ĉiam estas bona ideo. Unu vere uzebla estas la *Gratmapo*<sup>4</sup> (*Scratch Map*): Vojaĝemuloj povas forgrati aŭrofolian tavoloeton de la jam vizititaj lokoj kaj aperigi la kolorojn sub tiu tavoloeto, samtempe registradante kiom ili jam vidis de la tero.

Dua mojosa mapo estas la Tutmonda *Metroomapo*<sup>5</sup> (*World Tube Map*): Ĝi haveblas en diversaj grandecoj kaj montras la urbojn de la mondo kiel imagitan metrosistemon. Tio do estas bonkonata stilo bele aplikita.

### Lingvoj

Eble viaj eperantistaj amikoj ankaŭ ŝatas lerni aliajn lingvojn? Kio do pri aĉeti por ili lingvokurson aŭ lernolibron? Ĉi tie ekzistas ege multaj opcioj, se vi nur scias pri kiu lingvo temu ekzakte. ;) Tie helpas nur demandi!

1) Kun la obligacia rimarko ke vere nur estas proponoj; nek mi nek iu alia el la kune-teamo profitas finance aŭ alie se vi aĉetas iun el la specife nomataj eksteraj artikloj. Nun ĝoju la legadon :)

2) e-lingva: <http://katalogo.uea.org/index.php?st=novaj>

3) e-lingva: [http://www.esperanto-buchversand.de/kategorien/je\\_reduktitaj\\_prezoj.html](http://www.esperanto-buchversand.de/kategorien/je_reduktitaj_prezoj.html)

4) anglalingva: <https://www.luckies.co.uk/gift/scratch-map-personalised-world-map-poster>

5) anglalingva: <http://www.firebox.com/product/6205/World-Tube-Map>

Mi opinias ke specife se la objekto de lernemo estas iu konstruita lingvo, vi povos ĝojigi homon per tiuspeca donaco – vidu ekzemple la *Vortaron de la Klingonda*<sup>6</sup> aŭ la libron *Vivanta Lingvo: La Dothrakia*<sup>7</sup> (*Living Language: Dothraki*).

### ...Ĝirafoj?

Tio eble ŝajnas senrilata, sed certe vi kaj la pridonacotulo konas ĉies plej ŝatatan Esperantan vortludon: *Kial ĝirafoj neniam estas sola?* – *Ĉar ĝi havas kolegon!* Nia lingvo vere havas rilatojn al ĉiuj ajn aspektoj de l' vivo. Kaj troveblas multaj belaj aŭ utilaj donaceblecoj ĝirafiformaj! Specife mi povas proponi la *Trinkujon Ĝiraflekan*<sup>8</sup> (*Giraffe Moo*) aŭ – se vi ne hezitos elspezi iom pli da mono – la *Ĝiraflibroapogilojn*<sup>9</sup> (*Giraffe Bookends*).

### Kaj fine.....

vi povas fari donacon tre specialan, pleje ĉar ĝi estas daŭra donaco: membreco en la Germana Esperanto-Junularo. Tiu membreco havas, kiel vi verŝajne scias, kelkajn avantaĝojn; interalie la dumonatan ricevon de via *kune*. La kotizojn vi trovos interrete.<sup>10</sup> Ĝojon do, disdonu per tiu bonego esperantisma faro!

Nun nur restas al mi deziri al vi bonajn tagojn kaj multan ĝojon al ĉiu donacanto kaj donacricevanto!

**Timo Pähler**



6) germanlingva: [http://www.buecher.de/shop/star-trek/star-trek-das-offizielle-woerterbuch-ebook-epub/okrand-marc/products\\_products/detail/prod\\_id/38584910/](http://www.buecher.de/shop/star-trek/star-trek-das-offizielle-woerterbuch-ebook-epub/okrand-marc/products_products/detail/prod_id/38584910/)

7) anglalingva: <http://www.livinglanguage.com/dothraki>

8) anglalingva: <http://yas-ming.mysupadupa.com/collections/moo-cups/products/moo-cup--3>

9) anglalingva: [https://www.etsy.com/listing/92351476/giraffe-metal-art-bookends-free-usa?ref=shop\\_home\\_active\\_3](https://www.etsy.com/listing/92351476/giraffe-metal-art-bookends-free-usa?ref=shop_home_active_3)

10) germanlingva: <http://www.esperanto.de/de/dej/mitgliedschaft>



# Bonvenu, arbo en verda bril'

Ĉi tio estas traduko de la norvega kristnaskkanto *Du grønne, glitrende tre*, kies tekston verkis Johan Krohn. Ekzistas diversaj melodioj; mi mem plej ŝatas tiun verkitan de Edvard Grieg.

*Bonvenu, arbo en verda bril',  
vi bonŝatato kun ĝoja helo,  
sur ĉiu branĉo kristnasklumil'  
kaj supre staras glimanta stelo!  
Ĝi linde oru, ke ni memoru  
pri nia di'.*

*Dum kuŝis mondo en granda ve',  
ĝi lumon donis fidanto-ronden:  
Al la homaro ĝi montris, ke  
Jesuo eta senditis monden;  
brilĉarmon havis, l' anĝelojn ravis  
en Betlehem'.*

Du grønne, glitrende tre, god dag

T: Johan Krohn  
M: Edvard Grieg

Musical score for the song 'Du grønne, glitrende tre, god dag'. The score is written in G major and 3/4 time. It consists of three staves of music with lyrics in Norwegian. The lyrics are: 'Du grøn-ne, glit-ren-de tre, god dag! Vel-kom-men, du som vi ser så gjer-ne, med ju-le-lys og med nors-ke flagg og høyt i top-pen den blan-ke stjer-ne. Ja, den skal skín-ne, for den skal min-ne oss om vår Gud.'

*Pri Jesueto en rakontar'  
de panjo hejme ni aŭdis ofte;  
La lum' pri ĉiu pacema far'  
kaj vorto nin memorigos softe:  
La stelo helas kaj daŭre belas  
sur l' kristnaskarb'.*



# Esperanto – propedeŭtika lingvo

Kelkfoje homoj diras, ke Esperanto por Esperanto-parolantoj ne necesas, ĉar multegaj el ni parolas la anglan (kaj aliajn lingvojn).

**N**u, ne ekzistas nur du eblecoj, ke oni parolas fremdan lingvon aŭ ne. Estas pli komplike, estas diferencoj de nivelo: Mi bone parolas la anglan – sed mi ne povas senpene verki artikolojn en la angla sen eraroj. Tion mi kapablas en Esperanto.

Kelkaj Esperanto-parolantoj bedaŭras, ke multaj homoj en la mondo lernas la anglan. Mi kontraste ĝojas pri ĉiu el ili: La angla estas bona komenco por poste pli facile lerni nian lingvon!

Tion mi nomas „la nova propedeŭtiko“ :-)) – kaze ke vi konas la terminon kaj ideon de Esperanto kiel propedeŭtika lingvo.

Mi ŝatas diri, ke ĉiu instruero de la angla estas dek instrumentoj por Esperanto. Sed ne prenu tion tro precize.

Mi scias, ke multaj el la lernantoj de la angla post kelkaj jaroj konstato, same kiel mi, kiom senfina estas la lernado



de la angla. Oni progresas kaj progresas – kaj tamen daŭre restas multo por lerni, daŭre mankas kelkaj vortoj en ĉiu libro-paĝo, daŭre oni faras erarojn... Kaj la angla ŝanĝiĝas... Kaj ĝi estas malsama en diversaj partoj de la mondo...

Kelkaj el la angla-lernintoj aŭdos pri Esperanto kaj iuj el ili lernos nian lingvon kaj ĝuos ĝin. Tio jam okazadas ĉiutage.

Mi ankaŭ ne havas zorgojn pri la denaskaj parolantoj de la angla. Kiam ili uzas la anglan en praktika internacia etoso, multaj el ili konstato, ke eble estas psike agrable havi superan nivelon – sed la nivelon de la komunikado difinas tiu kun la malsupera nivelo. Oni ne povas transdoni pli da informoj ol la alia sukcesas kompreni. Oni ne povas ricevi pli da informoj ol la alia sukcesas esprimi. Kaj la komunikado ne povas okazi pli rapide ol la pli malrapida sukcesas partopreni en ĝi.

Pro ĉio ĉi mi estas pli kaj pli trankvila kaj optimisma pri Esperanto. Nia lingvo plu disvastiĝadas depost la fino de la dua mondmilito – ne ĉiam tre rapide, sed daŭre. Ni regule eniras novajn kampojn, daŭre okazas progresoj,

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Historio\\_de\\_Esperanto#Datoj\\_el\\_la\\_Esperanto-historio\\_.28kronologio.29](https://eo.wikipedia.org/wiki/Historio_de_Esperanto#Datoj_el_la_Esperanto-historio_.28kronologio.29).

Ĉiutage la Esperanto-kurson ĉe *Duolingo* finas proks. 150 homoj. Iuj komencas viziti lokajn kunvenojn jam baldaŭ post la komenco de la lernado. Aliaj lernas Esperanton per pliaj lingvo-retejoj, en kiuj la ĉeesto de Esperanto jam fariĝis normala afero, se ili ofertas senkoste pli ol 25 lingvojn.

Ni ĝoju – kaj ni plu zorgu pri plia bona konatigo de la bela vivo de la internacia Esperanto-komunumo :-)).

**Lu Wunsch-Rolshoven**



Intervjuon kun Chuck Smith, iniciatinto de la Esperanta Vikipedio kaj kunordiganto de la Esperant-kurso ĉe Duolingo, alportis la decembro revuo *Esperanto*.





# Guto por Aalen, malgranda, konstante frapanta



**Bücher und Zeitschriften sind das Eigentliche, das eine Bibliothek ausmacht. Mit Wasser jedoch möchten Bibliothekare und Bibliophile lieber nichts zu tun haben.**

**S**o ist denn auch „guto malgranda konstante frapanta“ in der Überschrift nur symbolisch gemeint; Wasser brauchen wir in Aalen keines (Aalen hat ja Thermal-Mineralwasser und seine Limesthermen), wohl aber Spenden – und das jederzeit!

Es klingt immer blöd, wenn man auf die Frage „was hättet ihr denn gerne?“ jene Antwort gibt: „am liebsten Geld, auch wenn's nicht viel ist“. Gern will ich das mal an einem Beispiel aus jüngster Zeit deutlich machen, nachdem ich zuerst auf den materiellen Aspekt von Spenden abgehoben habe.

Denn Eines muss klar gestellt werden, und daran wird sich wohl nie etwas ändern: keiner in der deutschen Esperanto-Bewegung (und auch anderswo), der sich von Büchern und Zeitschriftenheften trennen möchte (oder muss, weil etwa eine Erbschaft ansteht, oder weil man selbst keine Erben hat, denen Esperanto am Herzen liegt, weil zuhause der Platz einfach nicht mehr reicht, weil man umziehen muss oder seine Sammlung an einem guten Platz gesichert wissen will), sollte sich fragen „Wohin damit?“

– Nein! Man sollte sich vertrauensvoll gleich damit an uns in Aalen wenden; denn an Zusendungen sind wir immer interessiert. Oft genügen eine oder zwei verschiedene Nummern einer alten Zeitschrift, um einen unserer Jahrgänge mit Lücken endlich zu komplettieren. Oder es findet sich zwischen Blättern mit alter Korrespondenz vielleicht ein Originalbrief von den Großen der Esperanto-Movado, wer weiß?

Gewiss, wir brauchen auch nicht einfach alles, aber vieles können wir doch gebrauchen. Oft ist es schade um die zerfledderten Heftchen oder unansehnlichen alten Büchlein, die nach nichts mehr aussahen und die die Erben deshalb „schon mal entsorgt haben“, um uns die Arbeit des Aussortierens und sich die Portokosten zu ersparen. Doch gerade daran sollte es nicht scheitern. Wenn wir nach vorherigem Kontakt an einer Zusendung interessiert sein, dann wird man sich über einer Kostenerstattung des Versands oder eine eventuelle Abholung einig werden.

Und damit sind wir nun schon beim Thema Geld! Auch Neuerwerbungen sind nicht umsonst, sondern kosten Geld. Deshalb erbitten wir uns Spenden.

Natürlich haben wir einen eigenen Etat, der uns Neuerwerbungen von Büchern, Abonnements von ausgewählten Zeitschriften, Erstattung von entstandenen Kosten (wie Zusendung von kostenfreiem Material) und bei Bedarf auch Erneuerung von Hardware erlaubt.

Doch in der Regel sind diese Mittel schnell aufgebraucht, wenn man nur das Nötigste beschafft. Während des diesjährigen UK in Lille verbrachte ich mehr als nur einen ganzen Tag im Libroservo, um das Angebot zu sichten und auf dem mitgebrachten Notebook anhand unseres Katalogs gleich zu verifizieren, ob eine Anschaffung notwendig ist oder das Werk schon im Bestand zu finden sei. Wir versuchen ja zu vermeiden, dass doppelte Exemplare gekauft werden. Dass wir dennoch mehrfache Exemplare in den Bestand integrieren und sammeln, steht auf einem anderen Blatt und hat immer besondere Gründe.

Am Ende hatten wir ganz schön zu schleppen, um die insgesamt 83 gekauften Bände ins Auto zu schaffen. Immerhin waren die Preise aus Anlass des Jubiläumskongresses einigermaßen reduziert, und wir haben die sonst üblichen Aufschläge für Steuer und Versand einsparen können, so dass am Ende einer Einsparung von mehr als 150 Euro eine Belastung unseres UEA-Kontos in Höhe von 909 Euro entgegen stand.

Es waren kleine und preiswerte Heftchen darunter, die unter 5 Euro kosteten, jedoch auch einige „dicke Fische“, die mit mehr als dem Zehnfachen zu Buch schlugen. Im Mittel kostete eine bibliografische Einheit 11 Euro.

Ich denke, schon das rechtfertigt unseren Aufruf, der Bibliothek wenigstens einen Tropfen auf den

heißen Stein zu spenden! Wer den deutschen Finanzbehörden ohnehin Steuern zu zahlen hat, kann diese immerhin durch eine Spende über eine gemeinnützige Einrichtung ein wenig reduzieren.



## Esperanto als Teil des Europäischen Kulturerbes?

Erstmals in 2018 findet ein Europäisches Kulturerbejahr statt: „Europas kulturelles Erbe ist ein maßgeblicher und unverzichtbarer Bestandteil unserer gemeinsamen europäischen wie auch lokalen Identität, dessen Erhaltung und Entwicklung unser permanentes Engagement fordert“. „Einbezogen werden in das Jahr alle Formen des kulturellen Erbes“.

Man könnte auf die Idee kommen, da auch als Esperanto-Bewegung teilzunehmen. Die Polen haben ja bereits vorgeführt, dass es wohl ernst zu nehmende Gründe gibt, Esperanto als Idee einem (wenn auch „nur“ nationalen) Kulturerbe zuzuschreiben..

Ernst gemeinte Vorschläge, die also nicht nur sagen „man sollte“, sondern auch zusichern, wer welchen konkreten Beitrag dazu liefern könnte und möchte, erbitte ich per Netzbrief an diese Adresse [responde@esperanto-aalen.de](mailto:responde@esperanto-aalen.de). Ich bin gerne bereit, mal zu sammeln und dann zu sichten, was es da so an Ideen gibt.

Wenn wir daran teilhaben sollen und wollen, dann ist es höchste Zeit; denn andere haben bereits fertige Konzepte vorgelegt. Also: nachdenken, und zwar sofort - nicht auf die lange Bank schieben!

Beleg: [http://www.dnk.de/site\\_de/index.php?node\\_id=2519](http://www.dnk.de/site_de/index.php?node_id=2519)

Utho Maier

The screenshot shows the website of the 'Deutsches Nationalkomitee für Denkmalschutz' (German National Committee for Monument Protection). The page is in German and features a navigation menu on the left with items like 'Wir über uns', 'Veranstaltungen', and 'Denkmalschutz'. The main content area is titled 'Europäisches Kulturerbejahr 2018' and contains the text: 'Europas kulturelles Erbe ist ein maßgeblicher und unverzichtbarer Bestandteil unserer gemeinsamen europäischen wie auch lokalen Identität, dessen Erhaltung und Entwicklung unser permanentes Engagement fordert - wie etwa durch die Initiative für ein Europäisches Jahr des kulturellen Erbes 2018. Unter dem Motto „Sharing Heritage“ sollen in dem Themenjahr alle Bürgerinnen und Bürger eingeladen werden, Kulturerbe zu erleben und ihre eigenen kulturellen Hintergründe einzubringen. Einbezogen werden in das Jahr alle Formen des kulturellen Erbes. Zentraler Ausgangspunkt soll das bauliche Erbe sein, dass aufgrund seiner Authentizität und Anschaulichkeit besonderes geeignet ist, Kinder und Jugendliche im Rahmen kultureller Bildung mit Geschichte und Kultur und weiterem materiellen wie auch immateriellen Kulturerbe in Berührung zu bringen. Das Jahr soll die europäische Dimension von Kulturerbe noch mehr ins Bewusstsein heben.' Below this text are links for 'Information zum Projektstand', 'Sharing Heritage - Konzeptpapier', 'Kurzfilm Mein Zuhause. Europa.', and 'Grußwort vom Präsidenten des Europaparlaments Martin Schulz'. On the right side, there is a search bar and a 'Aktuelles' section with a list of news items dated from 08.12.2015 to 06.10.2015.





## Eine erfolgreiche Spendenaktion

Zunächst einmal vielen Dank an all diejenigen, die auf unseren Spendenaufruf in *Esperanto aktuell* einen mehr oder weniger großen Geldbetrag gespendet haben.

Es kamen über 1000 Euro zusammen. Ebenso freut uns, dass über 60 Esperantisten den Weg wieder oder erstmalig in den DEB gefunden haben und durch ihren Mitgliedsbeitrag unsere gemeinsame Sache unterstützen. Die neue DEB-DEJ-Geschäftsstelle hat hierzu sicher einiges beigetragen. Jeden Tag kommen Interessierte in die Katzbachstraße 25 und informieren sich über Esperanto. Es bleibt jedoch noch viel tun. Hierfür brauchen wir weiterhin Ihre Unterstützung: Vielleicht können Sie eine bestimmte Aufgabe übernehmen? Sprechen Sie doch mal mit uns. Weiterhin sind finanzielle Hilfen wichtig und sehr willkommen. Die Spenden können Sie übrigens von Ihrer Steuer absetzen. Unter 50 Euro genügt der Einzahlungsbeleg. Bei höheren Beträgen schicken wir Ihnen gerne eine Spendenbescheinigung zu. Nutzen Sie den beiliegenden Überweisungsträger!

Wolfgang Bohr

**46-jaraĝa esperanistino de Krakovo (psikologo kaj rusa filologo) serĉas eblecon fuĝi de la urba vivo kaj ekloĝi en vilaĝo por almenaŭ unu jaro kontraŭ helpo en mastrumado de la domo, kampo kaj bestoj. Mi mem havas kvar katojn :) – ili ankaŭ tre volonte translokiĝus kun mi. Mi parolas la anglan kaj la francan. Mi ankaŭ volonte okupiĝus pri maljuna homo kaj infano, se necesas. Mi povas ankaŭ instrui Vin pri la rusa lingvo. Kontakto: [myszkameister@gmail.com](mailto:myszkameister@gmail.com)**

## Weg mit dem alten Kram!

Immer wieder tauchen alte Werbe-Handzettel auf, die inhaltlich und formal längst nicht mehr aktuell sind.

Dabei ist eigentlich klar, dass veraltetes Werbematerial schlechter ist als gar keins. Sogar die erste Auflage der „neuen“ Serie ist inzwischen nicht mehr aktuell, weil sich nämlich die Adresse unseres Büros geändert hat und sollte daher vernichtet werden – und alle Materialien aus der Zeit davor erst recht. Der Handzettel „Esperanto auf einem Blatt“ war einmal eine gute Idee – in den siebziger Jahren des vorigen Jahrhunderts. Jetzt vermittelt das Blatt nur noch einen schlechten Eindruck. Es hat auch keinen Wert, die alte Adresse zu überkleben oder Ähnliches: Die Aufkleber kosten mehr Geld als neue Materialien, ganz zu schweigen von der Arbeit.

Der Vorstand hat daher beschlossen: Jeder, ob Ortsgruppe oder Einzelperson, der veraltete Handzettel an unser Büro in der Katzbachstraße einschickt, erhält die gleiche Anzahl aktueller Handzettel als Ersatz, wobei auf Wunsch großzügig aufgerundet wird. Alternativ, um das Porto zu sparen, kann das Einwerfen der alten Handzettel in eine Papiertonne dokumentiert werden (Foto, Filmchen), das dann als Datei an den Vorstand geschickt wird. Bitte nennen Sie unserer Büroleiterin Sibylle Bauer die Art und die Anzahl der gewünschten neuen Handzettel, sie wird Ihre Wünsche umgehend erfüllen. Aber werfen Sie den alten Kram weg!

Andreas Emmerich

### Rubuĵo

#### El Vikipedio, la libera enciklopedio

Rubuĵo estas ujo por kolekti kaj konservi rubojn, ĝis fina forprenado. Kutime rubuĵoj estas el plasto, ludo aŭ drato, sed povas esti ankaŭ el zinkita aŭ rustorezista ŝtalo kaj eĉ betono.

Ordinare akceptujo en la rubuĵo estas ŝanĝebla (fufoje havanta fiksilon de polietilena sako por rubo). Iufoje povas esti reverseblaj variantoj, en kiuj malplenigo disde rubo okazigas per renverso de la rubuĵo ĉirkaŭ la akso.

Rubuĵoj povas esti incendisekuraj, t.e. kovrilo de la rubuĵo servas kiel garantia altvalita estingilo, fermanta aeran penetron okaze de la ekbrulo, tiamaniere forigante la flamon.

Oni ankaŭ uzas la vorton por virtuala rubuĵo en komputilo.

Kelkaj rubuĵoj faciligas recikligon enhavante plurajn apartajn ujojn.



# La 12a Rata Rendevuo en Bad Münden la 18an de oktobro 2015

„Ĉu vi parolas la klingonan?“ („*tlhIngan Hol Dajath'a'?*“), estis demandita Martin Netter de la Filmwelt-Center en Bakede.

**B**edaŭrinde (ankoraŭ) ne, sed li povis prezenti al ni kelkajn ekspoziciaĵojn kun klingonaj literoj trovitajn en sia kolektaĵo, la plej granda privata kun originalaj *Star Trek* (Stela Vojaĝo)-ekspoziciaĵoj. Demandite li ne estis en la klingona, kiu ja estis speciale inventita de la lingvo-sciencisto Marc Okrand por la *Star Trek*-filmoj, sed en Esperanto, kiu ja jam pli aĝas ol la klingona. Grandan sukceson Esperanto ja nun ĵus atingis ĉe Duolingo: jam pli ol 170.000 homoj ene de duona jaro jam aliĝis al la kurso por parolantoj de la angla. Kaj nun estos ankaŭ evoluigata kurso por hispanparolantoj. Espereble ankaŭ baldaŭ sekvos Esperanto-kurso por germanparolantoj kaj aliaj lingvoj. Kaj ankaŭ kurso de la klingona estas ĵus nun evoluigata. Elŝuteblaj ili estas aŭ baldaŭ estos en la reto, serĉante *Duolingo*.

Jam la 12an fojon la Esperanto-grupo Hameln invitis al Rata Rendevuo en la urbon de la subdistrikto Hameln-Pyrmont aŭ la najbaran urbon. Bad Münden la unuan fojon estis la celo. Kaj ne nur venis Esperanto-amikoj el la najbaraj grupoj en Detmold kaj Bielefeld. Ankaŭ de la Subvisurgo, el Göttingen, Hamburgo kaj eĉ el Nurembergo venis partoprenantoj al Bad Münden.

Post salutado en glaciaĵkafejo la „Fantomo de la Süntel-monto“ ĉiĉeronis la vizitantojn tra la pitoreska urbocentro kaj la kuracparko. Amuzaj anekdotoj pri salbologistoj, amantaj paroj, vitroartaĵoj ktp. revivigis al ni la pasintecon. Mangante picojn kaj pastaĵojn la partoprenantoj ankaŭ iom retrorigardis al la ne tiom fora pasinteco, kaj laŭdis la 92an Germanan Esperanto-Kongreson, kiu okazis dum Pentekosto en Hameln. Kaj ankaŭ pri la 100a Universala Kongreso en Lillo ni interŝanĝis bonegajn spertojn.

Poste ni veturis al la „estonteco“, al Bakede, al kapitano Kirk. La luksaj uniformoj kaj aliaj unikaĵoj el la kolektaĵo memorigis multajn el ni pri la televidaj serioj kaj la filmoj. Ĉe kafo kaj kuko en korta kafejo ni ankaŭ jam planis la aktivizaĵojn por la venonta jaro, ekz. la partoprenojn en la Germana Kongreso en Munkeno, aŭ la Universala Kongreso en Nitra, Slovakio. Per „Ĝis revido en Munkeno aŭ ie ajn en Esperantujo“ ni adiaŭis post interesa kaj travivaĵplena tago.

**Heinz-Wilhelm Sprick**

Fotoj: la aŭtoro



Fantomo de la Süntel-monto kun la partoprenantoj



La grupo en la urbocentro de Bad Münden malantaŭ vitraj skulpturoj



La partoprenantoj kun la fantomo de la Süntel-monto antaŭ la Süntel-fago (speco, kiu nur ekzistas tie)



# Die Sprachenpolitik der EU

Vortrag von Prof. Dr. Sabine Fiedler am 05.05.2015 in Halle/Saale

Die Informationsveranstaltung zur Sprachpolitik in der Europäischen Union (EU) mit Professorin Dr. Sabine Fiedler von der Universität Leipzig ist der Esperantogruppe in Halle/ Saale in bester Erinnerung. Im Zuge der Europa-Woche konnte in Zusammenarbeit mit der Rosa-Luxemburg-Stiftung Sachsen-Anhalt dieser Bildungsabend organisiert werden.

Dr. Sabine Fiedler, Professorin für Anglistik wies auf die Differenz von Anspruch und Wirklichkeit in Bezug auf die Gleichberechtigung der Sprachen der Mitgliedsstaaten hin. Das heißt, die EU ist eine Gemeinschaft von 28 Staaten mit 24 Amtssprachen. Die Politik verweist ständig auf die Mehrsprachigkeit der EU als Grundlage ihrer Identität, und sie stellt die Wahrung der kulturellen und sprachlichen Vielfalt als Anliegen europäischer Politik dar. Rein rechtlich sind die Sprachen der Mitgliedstaaten gleichberechtigt, aber im Umgang miteinander geht jedoch der Trend zu einer einzigen Sprache - dem Englischen.

In jüngster Zeit häufen sich Untersuchungen und Publikationen, die zeigen, dass die Dominanz des Englischen zur Benachteiligung der Bürger nichtanglophoner Sprachen führt. Demzufolge erläuterte sie die Vorzüge und die Neutralität wie auch den Wohlklang des Esperanto, was die

Aufmerksamkeit des breiten Zuhörerkreises von Nicht-Esperantisten aktivierte. Sie gab Beispiele von der Struktur, dem Aufbau unserer rationellen Plansprache und dem ökonomischen Nutzen bei ihrer Anwendung in der EU.

Mit dieser Veranstaltung gelang es uns ein weiteres Mal, unser Sprachprojekt an die Öffentlichkeit zu bringen.

Esperanto-Gruppe Halle/Saale

Foto von Ulrich Steinweg

## La lingva politiko de EU

Prelego de Prof. d-ro Sabine Fiedler la 5-an de majo 2015.

La informan aranĝon pri la lingvopolitiko de Eŭropa Unio (EU) kun profesoro d-ro Sabine Fiedler de la universitato en Lepsiko la E-grupo de Halle bone memoras. Kadre de la Eŭropa semajno ni organizis en kunlaboro de la Rosa-Lüemburg-fondaĵo Sakso-Anhalto klerigan vesperon.

D-ro Sabine Fiedler estas profesoro pri anglistiko. Ŝi klarigis la diferencon inter postulo pri samrajteco de la lingvoj de la membroŝtatoj kaj la reala situacio. Eŭropa Unio estas unio de 28 ŝtatoj kun 24 oficaj lingvoj. La politiko daŭre emfazas la multlingvecon de EU kiel bazon de la identeco de EU, kaj ĝi proklamas la celon de la konservado de la multaj kulturoj. Laŭ la leĝoj de EU la oficaj lingvoj de la membroŝtatoj estas samrajtaj sed en realeco estas tendenco al nur unu lingvo: al la angla.

En la lastaj jaroj pli kaj pli esploroj kaj publikaĵoj montris, ka la domineco de la angla kaŭzas malavantaĝojn al la parolantoj de la aliaj lingvoj. Sabine Fiedler klarigis la avantaĝojn kaj la neŭtralecon de Esperanto (kaj ankaŭ ke ĝi sonas bone); la aŭskultantoj akceptis la informojn kun atento. Plie ŝi donis ekzemplojn pri la strukturo de la lingvo kaj pri la ebleco ŝpari multajn kostojn en la tradukado (t.e. ekonomia avantaĝo).

Per tiu aranĝo ni sukcesis prezenti nian lingvan projekton al la publiko.

Esperanto-grupo Halle/Saale

Fotis Ulrich Steinweg





# Kalendaro

## Januaro 2016

**06 – 10: POLUDNICA 2016** en Malaltaj Tatroj, Slovakio. Tradicia, jam 34-a renkontiĝo de esperantistoj – vojaĝantoj kaj turistoj. Inf.: Ján Vajs, LEK, Školská 4, Liptovský Mikuláš, Slovakio. Rete: <http://www.poludnica.esperanto.sk/>; [poludnica83@gmail.com](mailto:poludnica83@gmail.com)

## Februaro 2016

**13 – 15: 68-a Studsesio** en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio. Klerigado, lingva perfektigo. Studmodulo pri literaturo kaj tradukado. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=92783725>; [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

**14 – 21: 22-a Korusa Semajno ĉe Pireneo** en La Bastide/Hers, Arjeĝio, Francio. Ĉiutage: kantado sub gvidado de Zdravka Bojčeva, matenaj Tajĉi-ekzercoj, turismaj vizitoj, E-lernado, vesperaj ludoj, kulturaj prezentaĵoj, folk-muziko, io pli danke al vi! Du koncertoj je la fino de la semajno. Inf.: Jorgos & C.E.E.A. por Tut-Pirenea Esperanto-Koruso. Tutpeko ĉe Monik' Garrigues, Muejejo, FR-09 600 Limbrassac, Francio. Rete: [tutpeko@aliceadsl.fr](mailto:tutpeko@aliceadsl.fr) aŭ [esperanto.ariege@free.fr](mailto:esperanto.ariege@free.fr)

**15: Esperanto-maskerada kompanio** en Karnavala Parado en Rijeka, Kroatio. Vi povas aliĝi al la grupo kaj partopreni en la karnavala parado, aŭ esti spektanto de la parado. Inf.: Esperanto Societo Rijeka, Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, Kroatio. Rete: [rijeka@ri.htnet.hra](mailto:rijeka@ri.htnet.hra)

**20 – 21: Intensa Esperanto-kurso** en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio. Intensa semajnfino, lingvokurso ĉefe (sed ne nur) por komencantoj kaj komencintoj, en A1, A2-niveleoj, laŭ bezono ankaŭ en aliaj en kunlaboro kun Popolaltlernejo Osterode. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

## Marto 2016

**08 – 15: Mediteranea Esperanto-Semajno, MES-2015**, en restadejo Val d' Esquiere – Les Issambres ĉe la Lazura Marbordo, Francio. Ĉu vi ankoraŭ frostas en via regiono? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura

maro... Informoj kaj aliĝoj: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio, rete: [prezmoni@hotmail.com](mailto:prezmoni@hotmail.com), tel. +33 (0)4 94 83 06 88, aŭ Christine Graissaguel, [kris\\_grai@hotmail.fr](mailto:kris_grai@hotmail.fr)

**09 – 13: Intensa tutsemajna Esperanto-kurso** en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio. Tutsemajna Esperanto-kursaro kaj metodika trejnado en kunlaboro kun Popolaltlernejo (KVHS) Osterode. Agnoskita klerigesio! Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

**13 – 15: Intensa Esperanto-kurso** en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio. Semajnfina Esperanto-kurso en diversaj niveloj por progresintoj, ĉefe B1-B2-C1. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

**14: Literatura Tago ĉe IEI** en Hago, Nederlando. Literatura kunveno dum kiu Paul Gubbins, brita esperantisto, ĉefredaktoro de internacia Esperantlingva magazino *Monato*, membro de la Akademio de Esperanto, pritraktos diversajn erojn de prozo, poezio, dramo; i.a. Baghy, Forge, C. Rosetti, R. Rosetti, Auld, Boulton. Inf.: Internacia Esperanto-Instituto rete: [iesperanto@versatel.nl](mailto:iesperanto@versatel.nl)

**20 – 22: Studsemajnfino** en Schoonloo (inter Assen kaj Emmen), Nederlando. Kursoj por pluraj niveloj kostas 65-75 eŭrojn. Inf.: [esperanto-nederland](mailto:esperanto-nederland), Kruiszwijn 1205, NL-1788 LE Julianadorp, Nederlando. Rete: [studsemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studsemajnfino@esperanto-nederland.nl)

**20 – 22: 7-a BIERo** en Pelhřimov, Ĉeĥio. Promenoj, ekskursoj, ludoj.... (Bonvolu ne peti invitleteron.) Inf.: E-mental', rete: [e-mentalprago\(ĉe\)seznam.cz](mailto:e-mentalprago(ĉe)seznam.cz)

**27 – 29: Junulara Esperanto-Renkontiĝo, JER**, en urbeto Verőce, 50 km norde de Budapeŝto. Tradicia junulara semajnfino, la oficiala renkontiĝo por la jarĉefkunveno de la Hungara Esperanto-Junularo (la 29-an de marto). Inf.: Magyar Ifjúsági E-Szövetség / Hungara Esperanto-Junularo: [jer@jer.hu](mailto:jer@jer.hu)


**25 mar – 01 apr: 32a PSI**, Printempa Semajno Internacia: La paska renkontiĝo por la tuta familio en Bad Hersfeld, Germanio. [www.esperanto.de/psi](http://www.esperanto.de/psi); [petra.dueckershoff@esperanto.de](mailto:petra.dueckershoff@esperanto.de)

### Pliaj informoj ĉe:

<http://www.eventoj.hu/2015.htm>  
<http://www.esperantoland.org/renkontighoj/>

32a

PSI



La paska renkontiĝo por la tuta familio





printempa semajno internacia  
germana esperanto asocio - <http://www.esperanto.de/psi>

**Bad Hersfeld**

25a de marto – 1a de aprilo 2016

Germanio

# Krucenigmo / Kreuzworträtsel

	UNUNURA	POŝT-KARTO	LA TRIA TONO	EFEKTIVE EKZISTANTAN	PAROLADO KUN GLAS-TINTADO	SKELET-PART'	SPIRITA ATMOSFER'	NOMO DE LA 22-A LITERO	TUNO	DEFENDATA OPINIO	HOM-SIMILA BESTO	FARI, KONDUTI	FARITA EL SENHARIGITA FELO	SIMBOLO DE TALIO
UNUA PARTO DE LA KAŜTRAZO														
NUMERALO			ORIENTO GRANDA VENENA RABFIŜO						VAKSA STAMP' SPECO DE VIPO					
LITRO		TRABO POR VELO NECESO FARI ION						JUD' ĈEFURB' DE GREKIO						TUT-KVANTA PORTIL' POR GLASOJ
ROMP' DE GEEDZA FIDELECO						BLASFEMI KVIETIGA SIROPO						SOVAGA PORKIN' USONANO (familiare)		
	EPOKOJ, JARAROJ OBSTINA BEST'						KOMPLETAJ AFEROJ MUZIKA SONO						ETAJ DOLĈAKVAJ MAROJ PAGANTE PRUNTE-PRENOS	
MANGAĴ' POR ĈEVALO					PARTO DE INA ORGANO RILATA AL KULTURATA KAMPO						GLATIGI INTERNON DE TUBO FORTIKA PAPER'			
PANTALONA RIMEN'				TABUĴ' POR GRANDIGI TABLON MOVI SIĴON PER ILOJ						PER MAL-LONGA VIPO BRILA TEKSAĴ'				
LA TRIA TONO		MUZIKA INSTRUMENT' AGRABLA SENT'						JAPANA HAVENO KORPEKZERCA LUDO						SKELET' PLATA FARUN-BAKAĴO
SIMBOLO DE NEPERO			SKRAPOS KAMPON SURMURA ANONC-PAPER'						PARTO DE OKULO ESTI BLANKA PRO VARMEGO					
	TIBETA PASTRO BRUADO DE INSEKTO						VIRA SUR-VESTO VIC' DA SOLDATOJ						SUPRA MEMBRO RILATA AL FADEN-KRUCIGO	
AGRABLA VENTET'						BOTEL-STOPILO HEJTMATERIAL'						KOMPLETE, TUTINTENSE VOMIGA DROG'		
UTILIGL. KONSUMI			SAMSONEC', HARMONI' JURE NULIGAS LEĜON							RILATAN AL EGIPTA RIVEREGO OBLAT' SUR MEDIKAMENTO				
RILATA AL HEIMA FLUGILHAVA INSEKTO					JUNTAĴ' INTER OSTOJ ŜATEG-ANT'						SENKONSIDERA INFANECA AG' EFEKTIVA EKZISTAĴO			
KOLEKTA SUFIKSO			PRAA NACIA POETO ABELSIMILA INSEKT'						KATEĈU-PALMO PRAKTIKU VINTRAN SPORTON					
SIMB. DE DEŬTERIO		EKSPLODA GLOBO EN KIU LOKO						VIDI PREZENTAJON (rad.) BUŜA ULĈERET'						STULTA HOM' SINJORO
VID-ORGANA						RILATA AL INSULO EN EGEA MARO SIMBOLO DE ORO						EKVILIBRA (rad.) BEDAŬRA INTERJ.		
	RILATA AL AZIA ŜTATO SIMB. DE SULFURO						MALŜAT-INDA VIRO ROMANE "50"						RAPORTO (evi.) SIMBOLO DE VOLTO	
DUA PARTO DE LA KAŜTRAZO														







Partoprenantoj de la Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) kun Ilona Bohr en la mezo. Foto: Wolfgang Bohr